

Pri la Semajnfinoj de la Bona Volo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-746/118, 1983 decembro 01, 03

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-118/SRI-118-2-746-Claude-kaj-Andree-Gacond-Pri-la-Semajnfinoj-de-la-Bona-Volo.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ekde la unua semajnfino de la monato decembro 1982 disvolvigis preskaŭ ĉiumonate **Semajnfino de la Bona Volo**, kies celo estas helpi al la konstruo de Gastejo Edmond Privat en la urbo La Chaux-de-Fonds kaj al la administrado de Kultura Centro Esperantista.

A.- Kiam la unua Semajnfino de la Bona Volo estis anoncita, la dubemuloj sin demandis, ĉu vere venos helpantoj, des pli ke estis klare dirite, ke nenian repagon por la vojaĝkostoj ili ricevos. La rezulto estas, ke gejunuloj kaj malpli junaj esperantistoj el tuta Svislando kaj eĉ el aliaj landoj akuris trajne, aŭtomobile aŭ petveture por pioĉi, ŝoveli, veturigi ĉarumojn, ordigi gastĉambrojn, kudri, klasigi kaj analize statistiki gazetartikolojn, katalogi librojn kaj mastrumi por la kunlaboranta grupo.

Cl.- Tuj kreiĝis tute aparta etoso de kamaradeco, kiu malaperigis la aĝ-distancojn: ĉiuj sentis sin utilaj kaj fine de la dimanĉo entuziasmiĝis por la plenumita laboro.

A.- Ŝajnas, ke la dioj, aŭ kiel oni ŝerce diras, ke Zamenhof protektas la Semajnfinojn de la Bona Volo, ĉar ĝis nun, kaj ekde la unua en decembro 1983, la bela vetero ĉiam faciligis la konstrulaboron. En decembro 1982, en januaro 1983, kvankam malgranda tavolo da neĝo kovris la grundon, la tagmanĝojn kaj te-paŭzojn oni povis organizi ekstere sur la ĝarden-teraso: montara suno varme brilis kaj kuraĝigis ĉiujn.

Cl.- Dum tiuj manĝoj kaj vespere la gejunuloj komencis fari projektojn por la estonteco, kaj tiel renaskiĝis la esperanto-junularo sub tre pozitiva kaj simbola nomo: JES: Junulara Esperantista Svislanda. Per sia JES la gejunuloj volas montri, ke ili apogas la laboron entreprenitan de la olduloj kaj volas ĝin daŭrigi, unuflanke per aktiva laboro okaze de la semajnfinoj de la bona volo, aliflanke per vastskala propagando surstrata, por ke al esperanto aliĝu novaj helpemuloj.

A.- Sabat-vespere, post la bona manĝo, tiuj gejunuloj grupiĝis por diskuti cele al la redaktado de laborplano kaj de la statuto de JES. Poste ili komencis agadi. En Berno kaj en Zürich ili iris al la publiko por konigi al ĝi esperanton, kaj tiuj ĉi varb-kampanjoj plu-vigligis ilian laboremon.

Cl.- Por subvencii la laboron de la gejunuloj agantaj kadre de JES kaj partoprenantaj la Semajnfinojn de la Bona Volo en La Chaux-de-Fonds, la kaso de JES ricevas po dek svisajn frankojn por partoprenanto al semajnfino de la bona volo. Tiel pli konkretiĝis la ligoj ekzistantaj inter Kultura Cento Esperantista kaj Junularo Esperantista Svislanda.

A.- Kaj nun ni raportu pri la laboro, kiu efektiviĝis dum tiuj semajnfinoj, kiuj okazis en decembro 1982, januaro, februaro, marto, aprilo, majo, junio, septembro, oktobro, novembro 1983, kaj nun la 3-an kaj 4-an de tiu ĉi decembra monato.

Cl.- En keloj de la domoj de Gastejo Edmond Privat la plej fortikaj junuloj pioĉis por forpreni la teron kaj ŝtonojn. Ili fosis kvindekajn da centimetrojn. Poste ili kovris la fosaĵon per ŝtontavolo. La teron kaj troan ŝtonaron ili transportis en trogojn (tiujn vastajn rubujojn, kiujn kamionoj deponas okaze de domriparoj). La puŝado de la plensarĝitaj ĉarumoj ne estas ripoziga afero. Tiel kreiĝas estontaj salonoj.

A.- Saman laboron oni efektivigis inter du domoj cele al la kreo de estonta koridoro, kiu ebligos subtegmente transiri de unu domo al la alia.

Cl.- Multaj ĝardenmuroj bezonis riparon: tion ĉi efektivigas ĝenerale la inoj, ĉar eĉ se tiu ĉi laboro ne estas ripoziga, ĝi tamen ne estas tiom peniga kiel la pioĉado kaj ŝtonportado.

A.- Kaj la ĝardenoj bezonis plibonigadon: antaŭe ili estis utiligataj de legom-kultivantoj, sed iom post iom herbejoj kovris la tuton, divenigante tamen, kio antaŭe okazis. Senŝtonigo, ebenigo, plantado de estontaj arboj, jen aktiveco, kiun multaj ŝatas.

Cl.- Kelkaj helpantoj iom post iom transprenis precizajn taskojn: meblado de la transformitaj gast-ĉambroj kaj luotaj meblitaj loĝejoj. Jen entuziasmiga aktiveco por virinoj, kiuj ŝatas viziti meblo-ekspoziciojn kaj grupiĝi por kudri kurtenojn kaj litkovrilojn.

A.- En la oficejo de Kultura Centro Esperantista amasiĝas la laboro, kiun la regulaj deĵorantoj de la Centro ne povas plu kontentige plenumi, tiom kreskas la ĝenerala aktiveco de la institucio. Tial pli kaj pli da partoprenantoj al la Semajnfinoj de la Bona Volo akceptis precizan administran funkcion: ordigi la gazet-eltranĉaĵojn, kiujn la Centro ricevas tra la agentejo Argus, kaj poste analizi tiujn ĉi artikolojn por povi statistike raporti pri ilia enhavo kaj sinteno. Aliaj okupiĝas pri la brokantaĵoj de la arkivejo Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI), por ke tiuj libroj kaj revuoj povu esti interŝanĝitaj aŭ disvenditaj.

Cl.- Estas ankaŭ maŝinoj, kiujn oni povas utile funkciigi: la adresmaŝinon, la multobligilon kaj eĉ la tajpilojn.

A.- Pli kaj pli la Semajnfinoj de la Bona Volo fariĝas do kompleksaj rendezuoj de la kunlaborantoj de Kultura Centro Esperantista. Anstataŭ plenumi sian taskon en soleco, ili notas en sia kalendaro po unu rendezujan semajnfinojn en la monato. Kaj ili havas tiel la okazon konatiĝi kun la aliaj kunlaborantoj. Amikecoj naskiĝas, iniciativoj riĉigas la komunan aktivecon, kaj ĉiufoje novuloj venas kreskigi la helpantaron, kiu varias de monato al monato laŭ tre fleksebla maniero.

Cl.- Por la manĝoj oni aĉetas la varojn je la lasta momento, por ne devigi la helpantojn sin nepre anonci. Tiel lastminute iu povas aperi kaj sin proponi. Aliaj venas nur dum parto de la semajnfino, kaj ilia du- aŭ - tri-hora helpo estas ĉiam bonvena.

A.- Oni vidis gepatrojn veni kun siaj gefiloj, kiuj havis ĝojon dum momento ion cementi aŭ detruigi faligendan muron. Kiam ili laciĝas, ludojn ili faras.

Cl.- Oni vidis plurfoje luantojn de la domoj alporti sian helpon dum parto de aŭ dum tuta semajnfino.

A.- Fine de la unua laborjaro, kiam oni rigardas la plenumitan aktivecon, oni povas nur konstati, ke ĝi estas ege signifa. Povas esti, ke ĝi ne estas ĉiam tiel preciza, kiel tiu, kiun efektivigus fakuloj. Sed ĝi ligas al la Centro multajn homojn.

Cl.- Kaj oni konstatas, ke feriontoj fiksas kelkfoje sian restadon en La Chaux-de-Fonds por povi partopreni Semajnfinojn de la Bona Volo. Por ebligi al vi tion ĉi fari, ni anoncas la datojn de la programo 1964-a:

A.- 7-an kaj 8-an de januaro, 18-an kaj 19-an de februaro, 17-an kaj 18-an de marto, 7-an kaj 8-an de aprilo, 19-an kaj 20-an de majo, 16-an kaj 17-an de junio, 1-an kaj 2-an de septembro.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond raportis pri la Semajnfinoj de la Bona Volo. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), februaro 2013*